

MI ESTAS LA VOJO, LA VERO KAJ LA VIVO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Johano 14,1-12

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: „Ne maltrankviliĝu via koro. KREDU JE DIO KAJ KREDU ANKAŬ JE MI. En la domo de mia Patro estas multaj loĝejoj. Se ne estus tiel, ĉu Mi dirus al vi: Mi iras por pretigi al vi la lokon? Kaj se Mi foriras kaj pretigas al vi lokon, Mi revenos kaj prenos vin al Mi, por ke ankaŭ vi estu tie, kie Mi estas. Kaj kien Mi iras, - vi konas la vojon.”

Tomaso diris al Li: „Sinjoro, ni ne scias, kien Vi iras; kiel do ni povas koni la vojon?” Jesuo diris al li: „Mi estas la vojo, la vero kaj la vivo. Neniu venas al la Patro, krom per Mi. Se vi konas Min, vi konas ankaŭ mian Patron. Eĉ, jam nun Vi konas kaj vidis Lin.”

Filipo diris al Li: „Sinjoro, montru al ni la Patron; tio sufiĉas por ni.” Jesuo respondis: „Ĉu mi estas tiel longe kun vi, kaj vi ne konas Min, Filipo? Kiu vidis Min, vidis la Patron. Kial vi diras: Montru al ni la Patron? Ĉu vi ne kredas, ke Mi vivas en la Patro, kaj la Patro en Mi? La vortojn, kiujn Mi parolas al Vi, Mi parolas ne de Mi mem; sed la Patro estas en Mi, kaj per Mi Li agadas.

KREDU, ke Mi estas en la Patro kaj la Patro en Mi; aŭ almenaŭ kREDU JE MI pro la faroj mem, kiujn vi vidas. Mi certigas al vi: tiu kiu kredas je Mi, plenumos la agadojn, kiujn Mi faras, kaj eĉ pli grandajn, ĉar Mi iras al la Patro.”

Estas la lastaj momentoj dum kiuj Jesuo restadas kun siaj disĉiploj kaj Jesuo volas ilin trankviligi. Li volas komprenigi al ili paradokson: lia morto ne

estos por ili perdo, sed gajno; lia morto ne estos foresto, sed eĉ pli intensa ĉeesto. Jesuo do, kiu ĵus anoncis la perfidon de Petro al la disĉiploj kiuj estas maltrankvilaj kaj ke super la disĉiploj estas falonta teruran tempeston, Jesuo certigas ilin ke Dio estas kun li.

Jen kial Jesuo diras: "*Kredu je Dio kaj kredu ankaŭ je Mi.*" Kaj poste li trankviligas pri la efiko de sia foriro kaj diras ke: "*En la domo de mia Patro estas multaj loĝejoj.*" Ĉi tie oni devas bone kompreni tiun versiklon lige al la posta versiklo 24, kiam Jesuo diras: "*Se iu amas min tiu respektos mian vorton kaj mia Patro lin amos kaj ni venos al li kaj loĝos ĉe li*". Ne temas ĉi tie pri loĝejo ĉe la Patro, sed pri la Patro kiu venas loĝi inter la homoj. Tiu estas la novaĵo, la granda novaĵo proponata de Jesuo: ne plu estas iu sanktejo kie Dio manifestiĝas, sed en ĉiu persono, kiu lin akceptas, tie Dio manifestiĝas.

La Dio de Jesuo do estas iu Dio kiu petas esti akceptata por fandiĝi kun la persono, plilarĝigi sian amkapablon. Tiu estos lia loĝejo. Sed kial Jesuo parolas pri "multaj loĝejoj"? Pro la fakto ke, estante Dio amo, la amo ne povas sin esprimi kaj manifestiĝi en unu sola formo, sed en plej variaj formoj kiom plej variaj estas la naturoj de la homoj, iliaj situacioj. Jesuo poste daŭrigas tiun trankviligon dirante ke kie li estas tie estos ankaŭ ili, tio estas en la sfero de la dia dimensio, en la sfero de la amo.

Kaj je tiu punkto Jesuo estas interrompita de unu el la disĉiploj, Tomaso, kiu demandas, laŭlitere: "*Ni ne scias kien vi iras*". Estas verbo kiu indikas senrevena irado. Li ne komprenas kiel la morto povas havi pozitivajn flankojn. Kaj Jesuo respondas per solena, grava aserto, : "*Mi estas*" do li pretendas la dian kondiĉon, "*La vojo*", tio estas irado al io kaj tiu irado estas al "*la vero*". Jesuo ne asertas havi la veron, Jesuo ne diras: "Mi havas la veron", sed "Mi estas la vero".

Kaj li ne petas al la disĉiploj havi la veron, sed esti la vero. Granda estas la diferenco. Kiu havas la veron, pro la fakto mem ĝin posedi, taksas sin kapabla juĝi, kaj kondamni tiujn kiuj ne samopinias kiel li. Esti en la vero signifas esti enmetitaj en la sama dinamismo je amo de Dio kiu vidas la bonon de la homo kiel absoluta valoro. Esti en la vero signifas disiĝi de neniu, sed esti apud ĉiuj en sinteno de amo kiu transformiĝas en servado.

La vero estas dia dinamismo kiu ne povas esprimiĝi pere de doktrinaj formuloj, sed nur pere de ampropono kaj komunikado de am-agadoj. Kaj je

la fino estas *"la vivo"*. Kiu sekvas Jesuon en tiu irado kaj estas kiel li vero, tiu alvenas al la nedetruibla vivo, la vivpleneco.

Kaj psote Jesuo diras al la disĉiploj: *"Kiu vidis Min, vidis la Patron"*. Strange li ne diras: lin vi konos estonte, sed Jesuo asertas: *"Jam de nun vi lin konas kaj vi lin vidis"*. Kie la disĉiploj vidis kaj konis Jesuon? Dum la lavado de la piedoj. Jesuo kiu estas videbla manifestiĝo de Dio, montris kiu estas Dio: amo kiu iĝas servado.

Do, ju pli aŭtentika estas la aliĝo al Jesuo, farante el propra vivo amo kaj servado al la aliaj, kaj des pli granda estos la kono de la Patro. Kaj je tiu punkto estas alia disĉiplo, ĉifoje Filipo, li ne komprenas kiel en Jesuo povas manifestiĝi Dio kaj replikas: *"„Montru al ni la Patron; tio sufiĉas por ni."* Jen la grava revelacio de Jesuo: *"„Ĉu mi estas tiel longe kun vi, kaj vi ne konas Min, Filipo? Kiu vidis Min, vidis la Patron."*

Je la fino de la prologo al tiu evangelio, Johano faris gravan deklaron: *"Dion neniu iam ajn vidis, nur la filo estas tie revelacio"*. Kion tio signifas? Ke Jesuo ne estas egala al Dio, sed ke Dio estas egala al Jesuo. La evangeliisto invitas suspendi la penson pri Dio, la konon de Dio kaj koncentriĝi je Jesuo. Ĉio, kion Jesuo faras kaj diras, ĉio tio estas Dio.

Do ĉiuj ideoj, bildoj, pensoj, la konoj kiujn iu havas pri Dio, kaj ilin ne trovas en Jesuo, devas esti eliminataj, ĉar estas nekompletaj kaj falsaj. Jesuo estas tre klara: *" Kiu vidis min tiu vidis la Patron"*. Kaj kiu estas tiu Patro kiu manifestiĝas en Jesuo? Amo kiu iĝas servado, kiel ni vidis en la lavado de la piedoj.

Kaj Jesuo, antaŭ la nekredemo de la disĉiploj, diras al ili ke, se ili ne volas kredi pro liaj vortoj, kredu je li almenaŭ pro la agadoj. La agadoj – kaj la agadoj de Jesuo estas ĉiuj aktivecoj per kiuj li komunikas kaj pliriĉigas la vivon de la aliaj – estas la ununura kriterio de kredindeco. La finalo estas esprimita per solena formulo, per la Ameno, Ameno, tio estas *"Mi certigas al vi: tiu kiu kredas je Mi, plenumos la agadojn, kiujn Mi faras,"* la agadoj de Jesuo estas ĉiuj vivpovaj komunikoj por la aliaj kaj poste Jesuo diras – kaj povas ŝajni konsterna, *"tiu plenumos eĉ pli grandajn ol tiuj, ĉar Mi iras al la Patro."*

Kiel eblas plenumi agadojn pli grandajn ol tiuj de Jesuo? Jesuo ne povis respondi al ĉiuj bezonoj de la homaro, kaj estas en la komunumo de la disĉiploj kie li referencas al sia nomo kaj metas kiel ununura absoluta valoro

de la propra ekzisto – la ununura kaj sankta – la bonon de la homo, komunumo kiu memtiĝas en tiun dinamismon de “esti vero”, do ne havi la veron por prijuĝi la aliajn, sed esti por alproksimiĝi al ĉiuj, tio estas komunumo kie la dia agado kreskos kaj estos je alies favoro.

Diras Jesuo: “Ĉio tio okazos ĉar mi iras al la Patro”, ĉar li kunlaboras kun ili. Jesuo do certigas ilin ke lia morto ne estos foresto, sed ĉeesto eĉ pli intensa kaj viviga.